

Novembro

2024

Esperanto Societo Frankfurto

Esperanto-Informilo

Foto oktobro 2024: “Grupo de Esperanto- lingvokursantoj antaŭ la akvokastelo Oberwerries en Rejnland-Vestfalio malproksime de la urbo Hamm“

Mesaĝo de la prezidanto:
Mi partoprenis lingvokurson organizita de *Revelo*, tiu estas la **Re**jna-**Ve**stfalia **l**anda asoci**o**, kiu tre viglas kaj ofertis semajnfinon en belega malnova kastelo „Schloss Oberwerries“ apud la urbo Hamm. La kastelo estas ĉefe uzata de la gimnastika ligo de Vestfalio (germane: Turnerbund Westfalen), sed ankaŭ ofertas seminariajn ĉambrojn por grupoj kaj tranokteblecojn por individuaj vojaĝontoj, i.a. ankaŭ por biciklantoj (ĝi havas la ADFC-premion por biciklo-komplezaj loĝejoj, (german-angle: (Bett&Bike sigelo).

Amuzan legadon,
G. Hennemann, 1-an de novembro 2024

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

Bankverbindung / bankkonto:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag / jarkotizo:
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo
La 5-an de novembro 2024
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 19. November, 2024	Mardon, la 19-an de novembro, 2024
18:30 h Sprachrunde	18:30 h Lingvo Rondo
W. Ullmann	
-	-
19:30 h “Diskussion neuer Wörter die in das Duden-Wörterbuch Nr.29 aufgenommen wurden“	19:30 h “Diskuto de novaj vortoj enprenita en la Duden-vortaro n-o 29“
Ĉiuj	

Kvara mardo
La 26-an de novembro, 2024
ekde la 19-a horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

El la klubo

Anoncoj:

- 02.-03.11.24 — Librofoiro en Majenco kun Esperanto Librostando,
  Sabate de 11am ĝis 6pm
  Dimanĉe de 10am ĝis 5pm
  https://www.mainz.de/medien/internet/downloads/Flyer-Mainzer-Bu-chermesse-2024.pdf
- 05.11.24 19:00 — Babila Rondo
- 19.11.24 18:30 — Lasta klubvespero ĉi-jare en Saalbau MÜZ
- 28.11. – 01.12.24 — *Virtuala kongreso de UEA kun preleganto el nia klubo
- 14.12.24 tagmezo — Solenaĵo okaze de Zamenhof-Tago kaj poste kafumado
- 17.12.24 19:00 — Kristnaska kunveno en Saalbau MÜZ

5-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

28-a de novembro ĝis 1-a de decembro 2024

"Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo"

***De la 28-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 2024 okazos la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK).**
La VK fariĝis la plej grava kaj granda reta evento de Esperanto en la mondo! Vin atendos prelegoj, kursetoj, atelieroj, diskutoj, riĉa arta programo, prezentoj de Esperanto-organizoj dum la Virtuala Movada Foiro, laŭtemaj konversaciejoj kaj multe pli! La ĉeftemo de la 5-a VK estas "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". Eksciu pli ĉe vk.esperanto.net.

Kiel individua membro de UEA vi rajtas senpage partopreni en la VK. La aliĝo estas senpaga nur ĝis la 13-a de novembro! Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 5-a VK, faru tion per https://vk.esperanto.net/2024/aligxilo – elektu la butonon "Mi estas individua membro de UEA por 2024" kaj poste la butonon "Aliĝi al VK". Malfermiĝos la aliĝilo, kie sufiĉas informi vian UEA-kodon (en la formato xxxx-x; vidu vian UEA-kodon supre).

180-jariĝo de la libro „La Unikulo kaj lia posedaĵo” de Johann Caspar Schmidt kaŝnome *Max Stirner*

Eseo de G. Hennemann

Kiu estis tiu Johann Caspar Schmidt kaŝnome *Max Stirner* kaj kion li diras al ni ankoraŭ hodiaŭ? Max Stirner naskiĝis 1806 en Bayreuth kaj venis de etburĝa familio. La patro estis portretisto kaj faris lignajn blovinstrumentojn; li mortis en la aĝo de 37, kiam Max havis ses monatojn. En Bayreuth Max vivis kun siaj baptopatroj, frekventis la lokan mezlernejon kaj pasigis sian abituron tie en 1826 kun la takso "tre inda" kaj kiel la tria plej bona. Liaj instruistoj poste priskribis lin kiel tre talenta kaj promesplena. La gimnaziano kun la rimarkeble alta frunto jam estis ŝerce nomita "Frunto (dt: Stirn)" de siaj samklasanoj. Post sia abituro li studis en Berlino de 1826 ĝis 1828 je Hegel, Schleiermacher kaj aliaj. En 1828/1829 li estis enskribita ĉe la Universitato de Erlangen. Post longa paŭzo, li studis dum du pliaj semestroj en Berlino en 1832/1833 por plenumi la postulojn por instruado. Li kompletigis siajn studojn en 1835, sed estis nekapabla ricevi ŝtatan laboron kaj prenis sian unuan laboron en 1839 en privatlernejo por sekundaraj knabinoj en Berlino. Ekde 1841 li estis asociita kun la "Liberuloj", diskutrondo de opoziciaj (liberalaj kaj socialismaj) akademiuloj kaj ĵurnalistoj kiuj inkludis, inter aliaj, por mallonga tempo, Friedrich Engels. Tiutempe li publikigis artikolojn kaj gazetan korespondadon, kaj anonime kaj sub la pseŭdonimo "Max Stirner". De ĉirkaŭ 1843 li laboris pri la manuskripto de sia ĉefa verko “La Unikulo kaj sia posedo”. Tio aperis en oktobro 1844 kun eldondato de 1845. Ĝi tuj estis malpermesita, kaj post semajno - almenaŭ en la lando de Saksio - la malpermeso estis denove nuligita. Tuj antaŭe, Stirner rezignis sian laboron; la kialoj de tio ne estas konataj. Max Stirner tradukis “La Riĉeco de Nacioj (angle: The Wealth of Nations)” de Adam Smith en la germanan en 1847, daŭre skribis artikolojn, kaj plej lastatempe produktis kompilon *Historio de Reago* (1852). Li mortis jam en 1856 pro infekto kaŭzita de insektomordo kaj estis entombigita en Berlino. Lia postlasita havo devas esti konsiderata perdita: Nur tre malmultaj originalaj dokumentoj de kaj pri Stirner estis konservitaj. Ankaŭ ne ekzistas nuntempaj portretoj, nur du skizoj de Friedrich Engels, unu el 1842, kiu montras Stirner kiel parto de grupportreto de la “Liberuloj”. En esenco, la filozofio de Stirner, flankenlasante ĉiujn polemikojn, atentigas pri la homa eduko: post la klerismo, por vere atingi la eliron el la "nematureco", gravas ankaŭ forigi la "transejon (dt.: Jenseits) ene de ni". Ĉi tie ankaŭ evidentiĝas la pedagogia instigo de Stirner: ebligi al junaj infanoj eliri el ilia nematureco. Tiu ĉi klerigprocezo estas komprenata kiel turniĝo kontraŭ "kolektivismaj funkciadprocezoj", kiuj, laŭ Stirner, estas precipe evidentaj en religiaj kuntekstoj. Stirner nomas personon, kiu eliris el nematureco la "posedanto" (de "ĉio", inkluzive de si mem), kaj provoke ankaŭ la "egoisto aŭ unikulo". Posedantoj povas fundamente ekesti en du manieroj: aŭ per la tiel-dire aŭtoterapia

eduka ago de "kolerigo", komprenata kiel "ellabori min el kio ekzistas" (EE, 354), aŭ per speciala speco de edukado, kiu subtenas la ‚kreskadon‘ de la infano al la „posedanto“ de si mem kaj kiel eble malpli dependenda handikapulo‘ (vidu sekcion "Pedagogio"). Do li skribis nur unun ĉefverkon, sed tiu furoris kaj enbategis kiel bombo inter la intelektuloj kaj provokis reagon de multaj intelektuloj, eĉ de Karlo Markso kaj F. Engels.
Do la verko de Max Stirner, simile kiel dek jarojn antaŭe la verko de Henriko Heine, estis malpermesita, ĉar oni timis detruadon de disciplino kaj moralo. Sed Stirner ne nur evoluigis iun novan edukan teorion: Samtempe, li antaŭvidas kritikon de la posta historia materiismo, kiu atendas la aperon de la Nova Homo nur surbaze de historiaj leĝoj: „[politika] revolucio certe ne okazigas la finon [de la malnovaj kondiĉoj], krom se unue estas *indigno* kaj sekve estiĝas "posedantoj" (EE, 356).

Indigno ankaŭ devus esti la frapvorto por la hodiaŭa t.n. generacio Z. Indigno de la individuo kiel klarigita de Stirner cetere urĝe necesas por faligi la nunan tiel prosperon kaj gajnon bezonantan ekonomion, kaj por evolui novan komunismo-similan dekreskan (angle: degrowth) sistemon, kiu ne plu trouzas kaj eksplutas la planedon.
Stulpe[1] en sia interpreto de Stirner „vidas la nunan gravecon de la tiamaj Stirner-interpretoj en la fakto, ke la *unikulo* nun fariĝis laŭ certa maniero ĉiea. Hodiaŭ Stirner estas tial tute forgesita, ĉar la unikulo fariĝis memkomprenebla.“
Kvar jarojn poste, Peter Sloterdijk skribis, prenante la ideon de Stulpe, ke "en modernaj tempoj, sennombraj individuoj denove postulus la privilegion de esti unikuloj aŭ neordinaraĵoj, kutime sen kompreno ke farante tion, ili postulas la statuson de monstroj. Je Stirner, la terura infano de modernaj tempoj atingis sian reflektan formon".
Apartaj citaĵoj al lia verko: “La transejo (dt: Jenseits) ekster ni ja estis forbalaita, kaj la granda entrepreno de la iluministoj estis plenumita; nur la transejo ene de ni nun fariĝis nova ĉielo kaj alvokas nin denove kaj denove sturmi la ĉielon” - EE, 170. “Antaŭ la sankta oni perdas ĉian senton de potenco kaj ĉian kuraĝon ... kaj tamen nenio estas sankta en si mem, sed nur per Mia kanonigo, per Mia diro, Mia juĝo, Mia genflekso, mallonge per Mia - konscienco. ... Ĉio, por kio vi havas ian respekton aŭ gloron, meritas la nomon de la sanktulo.” – EE, 77. “Sole en timo ankoraŭ estas provo liberigi sin de tio, kion oni timas ... Aliflanke, en respekta riverenco la afero estas tute alia: Ĉi tie ĝi (la sankta) estas ne nur timata, sed ankaŭ honorata: tio, kion oni timas, fariĝis interna potenco, el kiu mi ne plu povas eskapi... Mi estas tute en ĝia potenco kaj eĉ ne plu provas liberigi min... Mi kaj kio estas timita estas unu." – EE, 78

Ligiloj: [1] https://www.lsr-projekt.de/stachel.pdf
https://www.lsr-projekt.de/msee.html#s3
http://www.max-stirner-archiv-leipzig.de/

El la kluba historio

Du paĝojn fotokopiita el la volumo „Band 3” de novembro 2000, kiam ankoraŭ estis du klubrenkontiĝoj ĉiumonate



JAŬDON, LA 2AN DE NOVEMBRO 2000

SAALBAU BOCKENHEIM

- LINGVA RONDO: PROF. DR. R. MAKABE
  OFTAMOLOGIAJ TERMINOJ
- POEMO: M. BOULTON: VALORO
- PRELEGO: DR. ALICJA SAKAGUĈI:
  EVOLUOTENDENCOJ DE ESPERANTO

Esperanto-Gesellschaft: „Entwicklungstendenzen des Esperanto – Eine kritische Betrachtung", Vortrag, 19.30 Uhr, Bürgerhaus Bockenheim, Schwälmer Str. 28, ☎ 0 60 31 / 46 17.



JAŬDON, LA 16AN DE NOVEMBRO 2000

BÜRGERTREFF BOCKENHEIM

„GEEDZIĜFESTOJ" - RESPONDECAS
S-INO J. BUB

Malgranda grupo ĝuis belan vesperon pri fianĉoj kaj fianĉinoj, kutimoj en diversaj landoj kaj babilis, babilis.

Ŝi maltrafis la rendevuon

Rakonto de Felmano Ulriko

La lastaj tagoj... ne de Pompejo, sed nia kunesto.
Sep jarojn ni vivis kune en ĉi urbo K., studante, lernante, manĝante, dormante, biciklante, vizitante, kisante, amante, diskutante, enamiĝante, farante...
Ni ne estis du paroj, kvankam estis du junaj knaboj kaj du virinoj.
Aĥimo kaj Susano tempe kunestis pare, tempe ne.
Monikino kaj mi neniam oficiale... kiam ŝi estis senpartnera mi ne estis libera, kaj inverse... ni sciis ke ni estus kune, eble por ĉiam, se ne hazarde ĉiam estintus tiel... sed la partneroj venis kaj deiris, tamen nia bendo restis, kreskis, eterniĝis...
Postrigarde, por mi mem sonas strange, kion mi ĵus skribis.
Kial ni tamen ĉiam kunestis kvarope, eĉ se ni samtempe havis oficiale alian partneron, amaton, kisatinon... kion ni faris?
Ni kvarope kuiris, trinkis, babiladis ĝisnokte... foje pli.
Ni enkinejis, muzikfestivalon partoprenis, teatron vizitis...
Ni migradis, babiladis, diskutis, disputis...
kaj foje ni intensege rigardis unu la alian, kun tiu stranga sentado, interne elektra, kirlada, aŭ niaj okuloj trafis sin, per tiu vido, profunda, emociega, ĥaosa... sed ni ne trotuŝis nin, sekve, ne lezis, kaj iam ni sentis kiel estinti konatuloj dum nia tuta vivo, iel simile al parencaj...

Estis inter ni, kvarope, intensaj rilatoj, sed la kvalito ne bone esprimebla. Ni ne estis geedzoj. Ni ne estis nur amikoj. Ni ne estis kunseksumantoj (almenaŭ ne ĉiam, ofte ne dum longa tempo), sed ankaŭ ne kiel gefratoj... ni estis mirakloj por ni mem. Kaj eble pro tio, ke ni ne estis oficialaj geamantoj, aŭ sekspartneroj, kaj eble pro tio, ke ni ne atendis ĉiam regule kunesti, ke ni ne loĝis samloĝeje, escepte ke Susano kaj Monikino komence, kaj Aĥim kaj mi dum

la lastaj jaroj kunloĝis, sed neniam en la kombino de virino kaj viro, ke ni foje ne vidis nin dum kelkaj semajnoj, ofte tial ĉar unu de ni havis novan amrilaton ekster nia kvaropularo, eble pro ĉio tio estis, ke niaj rilatoj travivis nian tutan studentan tempon en tiu urbo.
Sed iam ili venis, la lastaj tagoj... ĉiu de ni havis malsamajn planojn, kaptis aliajn ŝancojn... Aĥimo decidis iri al la Ŝvabaj Alpoj al turbinprodukta firmao (sed anstataŭe, baldaŭ estis en Japanujo), Susano decidis labori en kartografia instituto en Frankfurto (sed anstataŭe komencis labori kiel programisto en Ludvigburgo), mi planis subskribi kontrakton je japana firmao kaj translokiĝi al Japanujo (anstataŭe mi eklaboris ĉe firmao Volvo en Gotenburgo en Svedujo), kaj Monikino volis fondi danclernejon pri Flamenkodanco, ŝia hobio (sed ŝi akceptis oferton de franca firmao kaj iĝis altrangulo en la firmao St.Gobain en Parizo, kun salajro kiu estis la sumo de niaj tri aliulaj salajroj).

Sed ankoraŭ ni kunis. Estis somero, kaj ni sidis sur la vigla kaj bela merkatoplaco de Karlsruhe, Karoloripozo, apud la piramido, kiu fakte estis tombo, ĉar en ĝi troviĝas la cindro de la urba fondinto. Estis hele, varme, ni estis malstreĉite, iel melankolie. Ni ĵus finis viglan diskuton, kaj nun silentis, ĉirkaŭ ni la bruo kaj moviĝoj de centoj da homoj, bicikloj, kaj tramoj, kiuj daŭre pasis nin, kelkaj turniĝantaj je la piramido, tiam sonorigantaj por atentigi la biciklistojn, kaj en nordan direkton ni povis vidi la helflavan kaj blankan kastelon kun ĝiaj grizbluaj tegmentaj tegoloj, sur la centra turo la flago de la iama duklando Badeno.

Pasis tempo. Vagadis pensoj. Mi pritraktis miajn plej karajn amikojn. Ĉu vere tio finiĝu... nun? Kiel tio povis okazi? Ni neniam pensis pri tio. Ni simple akceptis nian kunvivadon, kuneston, sen pensi pri morgaŭ... ĉio nun ŝajnis esti neimagebla, ne reala...
"Ni devas..." Aĥim rompis nian ekziston haltigitan en la tempo.
"Kio?" diris Susano.
"...interŝanĝi niajn ontajn adresojn!" nun diris Monikino.
Tiam neniu havis interreton aŭ poŝtelefonon... baldaŭ, nia sola unua kontakteblo estus... skribi leteron. Letero, tio estis paperfolio, sur kiun oni skribis permane vortojn uze de krajono aŭ alia meĥanika skribilo. Poste oni faldu la folion duoble, metu ĝin en paperan kovrilon, formato B6, skribu sur tiun la adreson, surgluigu paperan poŝtmarkon... haltu! Kaj ne forgesu noti ie vian novan telefonnumeron, por ke ne letero restu por ĉiam via sola komunikilo. (Strangas tion skribi el hodiaŭa perspektivo, sed tiel fragila tiam estis la ligo al karuloj kiuj translokiĝis, kaj perdinte poŝtadreson povis kaŭzi ne facile ripareblan problemon.)
"Sed mi ankoraŭ ne havas ĝin!" diris Susano kaj Aĥim preskaŭ samtempe.

"Mi havas ideon!"
"Diru!"
"Ni fiksu tagon, dum kiu ni kunvenos denove ĉi-tie, kie ni nun sidas, venontjare, saman daton."
"Mi ne scias ĉu mi jam povas... estas ja Japanujo..."
"Ĉu en du jaroj?"
"Neeblas ke mi povas vivi tiom longe sen vi!"
"Estas ja nur aldona eblo... ni ja ne samtage translokiĝos, havos tempon poŝte sendi niajn adresojn al konataj adresoj, ĉio funkcios! Estas nur por vere vidi nin, ĉeeste, fizike, korpe..."
Mi pritraktis la okulojn kaj lipojn de Monikino, iel nekutime streĉite ŝi aspektis. Aĥim kun la helbluaj okuloj... Susano kun zorgofaltoj sur la frunto...
"Kaj kiel rezerva rimedo, en okazo, ke iu de ni tamen "perdiĝos". Sed celo estas ĝoje rekunveni."
Kaj brakumi, kisi, ridi... mi silente pensis. Rakonti kiel la vivoj en niaj novaj mondoj estas...

Tempo flugis.

Ŝi preparis matenmanĝon, kaj bonhumore fajfis kanton... kafo prepariĝis... Sur la kalendaro, ruĝa cirklo ĉirkaŭ tagnombro... tio estis hieraŭ, dimanĉo...
... ...
kulero falis el ŝia mano kaj faris klakan sonon sur la telero. Varmega sento estiĝis sur la supra dorso kaj moviĝis suben... ŝi nun memoris... ne... kial tio... mi stultulo... la tago... estis hieraŭ.

Laborloke, Pierre demandis, ĉu ĉio estas en ordo, kaj Claire demandis, ĉu ŝi ploris. Ŝi diris "jes" kaj "ne" kaj eniris apartan oficejon. Hodiaŭ ŝi ne iris tagmanĝi kun aliuloj. Ŝi komprenis, ke io por ĉiam finiĝis.

Epilogo.

Lastafoje ni kunvenis kvarope, Susano, Monikino, mi, 18 jarojn poste, okaze de la entombigo de Aĥimo, kiu mortis 47-jaraĝe pro kancero. La tagon kiam li mortis li provis alvoki min, sed ne sukcesis, kaj lasis tekstmesaĝon. "Uli, nun iĝas serioze", li diris. Mi aŭdis la tekstmesaĝon nur la venontan tagon. Ankaŭ mi maltrafis la lastan rendevuon.

- Finis -

Ni funebras nian estintan GEA prezidanton Sebastian Kirf, kiu mortis la 9an de oktobro 24 pro korinfarkto. "Sebastian kontribuis al Esperantujo per diversaj agadoj dum longa tempo. Mi memoras ekzemple lian diplomverkaĵon lige al Esperanto, liajn kvar jarojn kiel GEA-prezidanto (2013 - 2017), lian Esperanto-instruadon en lia altlernejo en Emdeno, liajn ekskursojn kun la Esperanto-studentoj al la kunsidoj de GIL, Gesellschaft für Interlinguistik, en Berlino kaj lian filman registradon de la prelegoj tie.
Li estis tre afabla kaj ankaŭ ridema homo, kiun revidi ĉiam estis granda plezuro." – Triste, Lu

Funebra anonco:
https://www.facebook.com/esperanto.deutschland/posts/pfbid0XCXMkE9ygCpVUvw4wNEEQZN6DdPEuppBHSEgQqZUhctbGLq6Lj1EfVNV5Xgi9umYl

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Viro ne fartas bone. La kuracisto petas lin malvesti sin. Dum la paciento malvestas sin, la kuracisto povas vidi liajn gambojn plenplenaj da bluaĵoj.
- Kian sporton vi praktikas? Futbalon aŭ hokeon?
- Skaton, sinjoro kuracisto.

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)
La proverbo kiun mi hodiaŭ prezentas temas pri Neatenditaĵoj.

Proverbo 731: Homo esperas, morto aperas

Fonto: https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0800.htm

Last Paĝo

Poemtraduku de la unuaj dek du strofoj el la poemaro „Germanujo. Vintra Rakonto" de Heinrich Heine“ farita de poemo-tradukilo subtenita de arta inteligento „Chat-GPT“,

https://chatgpt.com/g/g-6ed4kHvjw-poetry-translator/

Chat-GPT: „Jen estas la traduko de la unua ĉapitro de "Deutschland. Ein Wintermärchen" de Heinrich Heine al Esperanto:“

Mi: Nur unu lasta demando: Kial vi tradukis "Zuckererbsen" al "sukerkukurboj", devus ja esti "sukerpizoj", ĉu ne?

Chat-GPT: „Vi pravas, kaj mi pardonpetas pro la eraro. La ĝusta traduko de "Zuckererbsen" estas "sukerpizoj." Jen la korektita versio de la koncerna parto:“

Ĉapitro I

En malgaja novembro-monat',
La tagoj fariĝis pli grizaj,
La vento ŝiris foliojn de l' arboj,
Kaj mi vojaĝis Germanion trans.

Kaj kiam mi atingis la limon,
Mi sentis pli fortan batadon
En mia brusto, mi kredas eĉ
Ke miaj okuloj komencis larmi.

Kaj kiam mi aŭdis la germanan lingvon,
Mi sentis min strange;
Ŝajnis al mi, kvazaŭ mia koro
Tre agrable sangus.

Malgranda harpistino kantis.
Ŝi kantis kun vera sento
Kaj falsa voĉo, tamen mi tre
Emociiĝis pro ŝia ludo.

Ŝi kantis pri amo kaj amsufero,
Sindono kaj retrovo
Tie supre, en tiu pli bona mondo,
Kie ĉiuj suferoj malaperas.

Ŝi kantis pri la tera mizerejo,
Pri ĝojoj, kiuj baldaŭ malaperis,
Pri l' transmondo, kie la animo ĝuas
Transfiguriĝinte en eternaj feliĉoj.

Ŝi kantis la malnovan rezignacian kanton,
La Eiapopeia de l' ĉielo,
Per kiu oni dormigas, kiam ĝi ploras,
La popolon, la grandan stultulon.

Mi konas la melodion, mi konas la tekston,
Mi konas ankaŭ la sinjorojn aŭtorojn;
Mi scias, ke ili sekrete trinkis vinon
Kaj publike predikis akvon.

Nova kanto, pli bona kanto,
Ho amikoj, mi volas verki por vi!
Ni volas ĉi tie sur tero jam
Establi la ĉielregnon.

Ni volas esti feliĉaj sur tero,
Kaj ne plu suferi malsaton;
La pigra ventro ne festenu,
Kion laboremaj manoj akiris.

Ĉi tie kreskas sufiĉe da pano
Por ĉiuj homidoj,
Ankaŭ rozoj kaj mirtoj, beleco kaj ĝuo,
Kaj sukerpizoj ne malpli.

Jes, sukerpizoj por ĉiuj,
Tuj kiam la guŝoj krevos!
La ĉielon ni lasos
Al la anĝeloj kaj la paseroj.

--

Chat-GPT: „Dankon pro via pacienco kaj korekto. Se vi havas pliajn demandojn aŭ bezonas plian helpon, bonvolu informi min!“